


EL SCIENCOJ

INTERESAJ
KAJ/AŬ GRAVAJ
NOVAĴOJ

INTERFERAĴA AKUMULATORO
(Fizika paradokso)

Kiam plene interferas du radioj R_1 kaj R_2 ili tute mal-
aperas en spaco S . Spaco S estas kvazaŭ "nigra truo".



Sed "malaperas" ne signifas, ke ilia energio neniĝas. En spaco S energio de la radioj transformiĝas en ian kaŝan energion KE de magneta-elektra kampo.

Nun survoje de la radioj ni metu kaptilon - retorton Rt kun diafana fenestro unuflanke kaj kun maldiafana fenestro aliflanke tiel, ke la lasta trafu sur rando de "nigra truo".

Se la proceso de interfero (per utiligo de sun-radioj) daŭros sufiĉe longe, do en la retorto akumuliĝos granda kvanto da KE.

Jen ni havas akumulatoron malgrandan, pezetan, tamen treege kapacitan. Aviadiloj, ŝipoj, aŭtoj, busoj... ne plu bezonos brulaĵon (benzinon k.s.). Unu retorteto kun KE sufiĉos por jaroj. Kaj la urba aero estos pura pri haladza gaso k.a. venenaj substancoj. Realiĝos revo de Leonardo da Vinĉi pri la homa flug-kapablo, simile al la flugpovo de la birdoj.

Restas ankoraŭ problemo, kiel eligi KE el retorto kaj transformi ĝin en aplikeblan formon de energio. Nu, ĉi tio estas nur teknika tasko.

Ke principe ĉi tio eblas atestas tio: kiam mankas "kaptilo" la radioj "renaskiĝas" post trapaso de "nigra truo". Do, KE povas retroformiĝi en la originan energion. Kaj plue transformi ĝin en la elektro-energiecon estas ordinara teknika tasko.

Do principe ankaŭ "eligproblemo" solveblas.

Kiu solvos la paradokson? Aŭ kiu klarigos fizikan esencon de KE?

Z. Arbo

"MAN-LIBRO PRI TRANSPORTO DE FLUIDAĴOJ"
de Jacques MANCEAU (Saintes-Francio)

Inĝenieroj kaj teknikistoj silente laboras por ke Esperanto fariĝu utiligebla en sciencoj kaj tekniko, sed iliaj verkoj plejofte restas nekonataj de la interesatoj. Tial, mi hodiaŭ prezentas la plej rimarkindan el tiaj verkoj aperintaj en la 1973.